# El liberecana vidpunkto


**0**


2008/8

- La nuna prolataro
- Kooperativismo
- Afganio: kolonia milito
- Stowasser kaj la anarĥo-sindikatismo
- Liberecana municipemo










Esperantigitaj elĉerpaĵoj el liberecanaj gazetoj



## Ĉu homamaj komisioj?



# Statistikaj datumoj pri la nuna proletaro

## *Balance* (por *Ĥaoso ĉe la reto*, 2007.11.21)

*Proletaro* estas **objektiva** socia klasifiko, kiu montras ĉiun, kiu havas **salajran** rilaton kun mastro (ĉu privata aŭ la ŝtato).

*Meza klaso* montrus hodiaŭ tiun "aŭtonoman" laboristaron, kiu konsistas el sendependaj kaj "memekspluatataj" laboristoj, aŭ entreprenistojn sen salajruloj.

*Kapitalistoj* estus ĉiujn proprietulojn de produkrimedoj aŭ altajn administristojn kun decidpovo (ankaŭ se ili estus salajrataj) de grandaj entreprenoj aŭ ŝtataj entreprenoj.

La nuna kapitalista socio, kiu rajtigas nian socian triklasan klasifikon, kiu ebligas senliman gradecon de sociaj situacioj, distingiĝas per la **ekspluatado** de la laboristoj fare de la kapitalistoj.

Ĉiuj komprenas, ke estas ekspluatado, kiam oni parolas pri la infana sklava laboro ĉe manufakturoj en Hindio aŭ Ĉinio, kiuj produktas sportŝuojn aŭ vestojn el elstaraj fabrikmarkoj dum 18 aŭ 20 horoj tage, sen plia pago ol manĝaĵo kaj lito ĉe la sama laborloko, kaj kiuj vendas siajn produktojn en Eŭropo aŭ Usono. Kaj ĉiuj skandaliĝas antaŭ ĉi tiu ekspluatado de la infana sklava laboro.

Tamen oni devas kompreni, ke la **ekspluatado** de la salajrata laboro estas la **esenco** de la kapitalista socio. Ĉiuj la salajruloj suferas la kapitalistan ekspluatadon. Ju pli disvolviĝinta estas la produktiveco de la kolektiva laboro de socio, des pli alta la ekspluatadgrado spertata de ĝiaj laboristoj, kvankam ili povus konsumi pli da varoj.

Ni klopodos alporti objektivajn statistikajn datumojn, kiuj permesos al ni:

1. Kalkuli la proletigtakson.

2. Kompreni la ŝanĝojn, kiuj estas okazintaj ene de la proletaro dum la lastaj 60 jaroj (ekde la fino de la Dua Tutmonda Milito.

3. Kalkuli la ekspluatadtakson.

# La nuna proletaro

## 1. Kalkuli la proletarigtakson

Kiel proletojn ni komprenas la tuton de salajruloj plus senlaboruloj. Kiam tiu ĉi tuto plialtiĝas kiel pocento de la ekonomie aktiva loĝantaro, ni parolas pri proletigo.

Proletigtakso = aktiva loĝantaro / (salajruloj + senlaboruloj).

La proletigo estas fakto: la kvanto de salajruloj plus senlaboruloj kiel frakcio (pocento) de la tuta aktiva loĝantaro de Eŭropo emas plialtiĝi

| Lando | 1930-40 | 1974 | 1997 |
|---|---|---|---|
| Francio | 57,2 | 81,3 | 87,6 |
| Italio | 51,6 | 72,6 | 74,7 |
| Hispanio | 52 | 68,4 | 78,5 |

La antaŭaj statiskoj refutas **objektive** la tezojn pri la malaperigo de la proletaro, kiuj estas en modo ĉe iuj modernistaj, situaciistaj aŭ jarmilistaj medioj.

Iuj objĵetoj al la proletigprocezo: La salajruloj ŝparas kaj aĉetas privatan veturilon, propran loĝejon aŭ eĉ duan loĝejon!

Oni rimarku, ke neniel temas pri aĉeto de produktrimedoj. Ili estas aĉetoj, kiuj ne ebligas "ŝanĝi de klaso". Temas pri veturilo kiel laborilo, aŭ kiel transportilo por iri laboren, aŭ pri hipoteko kiel necesa balasto malpliiganta la realan salajron de la laboristo.

## 2. Kompreni la ŝanĝojn, kiuj estas okazintaj ene de la proletaro dum la lastaj 60 jaroj en Hispanio

La ŝanĝoj en la sociaj klasoj okazas ene de ĉiu klaso. La klasista struktura kunsisto en la kapitalismo estas fakte senŝanĝa laŭ la historio (ekde la 19a jarcento): ĉirkaŭ 5% de regantaj klasoj, 15 ĝis 20% de mezaj klasoj kaj 75 ĝis 80% de subpremitaj klasoj.

Pri la regantaj klasoj: la klasifikoj de Marx (industriaj kapitalistoj kaj bienuloj) aŭ de Marx kaj Hilferding (industria kaj financa kapitalo) aŭ de Lenin (nacia kaj internacia kapitalo) malaperis je la nuna tutmondiĝa procezo. Hodiaŭ ano de la reganta klaso diversigas siajn investojn tra ĉiuj branĉoj de la produktado kaj distribuo aŭ servoj. Kio gravas estas la kvanto de la kapitalo kaj ties situo. Daŭre estas enaj kontraŭdiroj, sed tiuj rimarkitaj de Marx jam ne ĉefas. Oni rimarku la sennomecon, la produktfinancan diversiĝon kaj la sennaciismon proprajn al la grandaj transnaciaj korporacioj. La mezaj klasoj estas senĉese minacitaj proletiĝi kaj fajte multaj el iliaj anoj fariĝas salajruloj (nur malmultaj atingas la regantan klason), sed entute ili sin tenas en tiu 15 ĝis 20% de la loĝantaro.

La salajruloj, aro sociologie iom pli ampleksa ol tiu de la proletoj, estas klaso ĉe senĉesa **absoluta kaj relativa** kreskado. La salajriĝo de la kapitalista socio ne haltigas, kontraŭe ĝi pliiĝas senĉese.

La bazaj ŝanĝoj inter la salajruloj, kaŭzitaj de la granda ekonomia krizo ekiĝinta je la sepdekaj jaroj, estis la sekvantaj:

1. La industria laborista klaso atingis sian pinton je la kvindekaj jaroj. Poste ĝi malpliiĝis kaj absolute kaj relative ĝis la 30% de la salajruloj (ankoraŭ sub senĉesa malpliiĝo).

2. La intelektaj aŭ altkvalifikataj laboristoj – ankoraŭ pliiĝantaj– atingas la 20% de la salajruloj.
3. La nesufiĉecaj laboristoj, aŭ voje al marĝena stato, atingas la 50% de la salajruloj.

La tielnomita terciariĝo de la socio estas tute heterogena kaj oni devas diferencigi inter

1. **Nesufiĉeculoj** de la sektoroj hotelaj, rubaĵ-manĝaj, domservaj kaj aliaj. Tio estas la nesufiĉeca terciaro kun malaltaj salajroj, nedaŭraj dungoj kaj malbonegaj laboraj kondiĉoj.

2. **Altkvalitaj servoj** kun ege kvalifikitaj salajruloj: ĉiaj asesorejoj, servoj al la firmaoj, grandaj profesiaj oficejoj (advokatoj, notarioj, privata medicino) kaj aliaj. Tio estas la avantaĝa terciaro kun altaj salajroj, daŭriga dungo kaj bonegaj sociaj prestaĵoj (pensiplano, loĝejo, veturilo, poŝtelefono, kuraca asekuro, ktp, je la konto de la firmao).

3. La praktika malapero de la primara sektoro (agrokulturo kaj minindustrio) kvante nerimarkinda rilate al la tuta aktiva loĝantaro.

## 3. Kalkuli la ekspluatadtakson

Ĝi estas la kvociento resultanta el dividi la du labortagpartojn: tiun pagatan kaj tiun nepagatan.

Plusvalortakso = plusvaloro / variebla kapitalo

(Kie plusvaloro estas la profito de la kapitalisto kaj variebla kapitalo la salajroj)

Ĉe la kapitalismo ĉio iĝis varo: ĉio. La laborforto estas la nursola varo kapabla krei plusvaloron.

La produktprocezo de la kapitalo havas neniun celon plu ol la kapitaligo de tiu ĉi plusvaloro.

Ni jam vidis, ke la plusvalortakso estas matematike mezurebla.

Statistiko, montranta la evoluon de tiu ĉi takson, ebligos konfirmi sian pliiĝon dum determinita periodo.

Tiu statistiko videbligas ĝian falon dum la lastaj jaroj de la frankismo kaj ĝian pliiĝon ekde la Transiro kaj dum la demokratia periodo.

Oni povas vidi ankaŭ la pliiĝon de la ekspluatadtakso per statistikoj, montrantaj la partoprenon de la salajruloj en la tuto de la nacia rento. La evoluo montras ĉiam malplian partoprenon de la salajruloj pli rimarkinde ĉe Hispanio ol ĉe la cetera Eŭropo.

## La ĉefaj ŝanĝoj ene de la laborista klaso

1. Malpliiĝo de la kvanto de klasikaj industriaj laboristoj ĝis 30% de la salajrularo. Perdo de ilia **findecida** politika kaj sindikata rolo ĉe la klasbatalo. Ĝi tamen ne malaparis.

2. Pliiĝo de la intelektaj salajrataj laboristoj (inĝenieroj, teknikuloj, reserĉistoj, ktp).

3. Disfalo de la agraj salajruloj. Estas malapero de la primara sektoro (agrokulturo kaj minindustrio), kiu iĝas kvante nerimarkinda rilate al la tuta aktiva loĝantaro.

4. Spektakla pliiĝo de la **priservaj** laboristoj. Divido de la serva sektoro en du grandaj aroj: **avantaĝa terciaro** (asesorejoj, advokatoficejoj, privata medicino...) kaj **nesufiĉeca terciaro**, konsistiganta ĉefe el virinoj kaj enmigruloj.

Tiel do la hispana socio kaj ankaŭ la eŭropa transiris el la elstareco de la klasika industria laboristo, vira kun vivdaŭra dungo, sindikatiĝinta, al la elstareco de la priserva laboristo, karakterizita de nesufiĉeca laboro, ina kaj enmigriĝinta, ne sindikatiĝinta nek politikiĝinta, kiu laŭ la oficialaj statistikoj atingas la 50%-n de la aktiva loĝantaro, sed, se oni enkalkulas ĉian nesufiĉecon (tio estas mergita ekonomio, marĝenaj situacioj, longdaŭraj senlaboruloj kaj ne censitaj antaŭemeritoj, hispanaj elmigruloj, kiuj ankoraŭ estas 1,5 milionoj), ĝi povas atingi la 70%-n de la (ampleksiĝanta) aktiva loĝantaro.

El la fordismo, karakterizita de la produktĉenoj kaj grandaj fabrikoj, de la sindikatiĝinta vira vivdaŭre dungita metal- aŭ aŭtomobillaboristo, kiu ludis centran rolon kaj kiu, kvankam ne malaperinta, malpliiĝis ĝis 30% kaj estas ĉiam malpliiĝanta, trapasis, kaŭze de la ekonomia krizo ekiĝinta meze de la 70aj jaroj, al la postfordismo per spektakla pliiĝo de la priserva rublaboro, karakterizata de laboruloj ĉefe enmigriĝintaj, inaj, kun malaltaj salajroj kaj portempaj dungkontraktoj, ne sindikatiĝintaj, kaj kiu atingas 50%-n de la aktiva loĝantaro.

La laborista klaso do aperas kiel tre **heterogena** klaso, per senĉesa absoluta kaj relativa pliiĝo kaj kun laboraj

kaj salajraj kondiĉoj, kiuj emas al rimarkinda nuna kaj estonta malbonigo.

## Sekvoj de la nesufiĉeco

En Hispanio 6 ĝis 7 laboruloj el ĉiu 10 estas nesufiĉecaj.

Multaj laboristoj devas elekti aŭ la senlaborecon aŭ la nesufiĉeson. La ĉiamdaŭra dungo estas rezervita por nur tiuj sektoroj, kiuj bezonas altkvalifikitan laboron.

La amasaj translokigoj kaj restrukturigoj de la 70aj kaj 80aj jaroj, la pliiĝo de la senlaboreco kaj la grava migranta fluo fomentas la tendencon al la pliiĝo de la nesufiĉeca laboro.

La nesufiĉeciĝo, kiu tuŝas ĉefe la pli junulojn, la pli ol kvindekjarulojn (malgraŭ la statistikoj falsigitaj de la neenkalkulo de antaŭtempaj emeritu-loj kaj longdaŭraj senlaboruloj) kaj la pli novajn enmigrulojn, implicas statojn de labora sendefendo kaj neelteneblan pliiĝon de la labora akcidenteco (ĉefe ĉe la konstruindustrio), kiu lokigas la hispanajn taksojn inter la pli altaj el la Eŭropa Unio per averaĝo de 3,9 ĝis 4,3 mortoj tage.

La sanitara kaj instrua deficito, per budĝeto ne enkalkulanta la enmigradon kaj eĉ malpli la "senpaperan" enmigradon, povas estigi sociajn kaj rasajn konfliktojn por nesufiĉaj kaj malboniĝintaj rimedoj, ĉiam arigitaj en urbopartoj de amasa enmigrado. Ĉiuokaze tio estas problemaro fomentanta dekstremegajn grupojn.

La ĉiam kreskanta mergita ekonomio sin nutras per "malleĝa" migrado, al kiu ofertas malstabilan, subpagitan kaj sen ĉia ajn rajto laboron.

### Bibliografio


Diego Guerrero: *La explotación*. El Viejo Topo.
Daniel Lacalle: *La clase obrera en España*. El Viejo Topo.


---


Elĉerpaĵo el *Kaos en la red* (Ĥaoso ĉe la reto). Esperantigita de Jurgo Akasaro

http://www.kaosenlared.net

# Kooperativismo.

# Historio de alternativo

## Jordi Suñé Morales




Ekde pli ol 150 jaroj elbaza movado, kiel estas la kooperativismo, eksperimentas alternativojn al la nuna kapitalista sistemo. Laŭlonge de ĝia historio la celo la kooperativistoj estis diversaj. Tiel ekzemple ĉe Katalunio ni povas trovi kaj kooperativojn stimulitajn de la *Mancomunitat* (kataluna federacio el municipoj) de la 1910a jaro kaj tiujn stimulitajn de la sindikatoj dum la intercivitana milito de la 1936a. Movado finfine instigita kaj kritikita de la laborista kaj kamparana movado kaj iujfoje de la eklezio kaj la administracio.

Unue, ni komencu klopodante difini, kio estas kooperativo: ĝi estas ekonomia unuo de produktado, enkomercigo aŭ komsumado, kiu apartenas al la samaj uzantoj de siaj servoj. Temas pri unuiĝo el personoj, kiuj kunlaboras por kunpartopreni la aĉetadon aŭ la servojn. Kaj ili estas multetipaj: sanitaraj, konsumaj, laboristaj, kamparanaj, ktp. El la jaraj profitoj unu parto oni dediĉas pliigi la kapitalrezervojn por povi fari pli grandajn aĉetojn, investadojn kaj deponaĵojn por akiri interezojn. Alia parto de tiu ĉi plusaj enkasigoj estas destinita al la societanoj. Ni povas legi ĉe Vikipedio, ke la kooperativoj estas "entreprenoj demokrate administritaj de siaj societanoj, por kiuj la propravola aliĝo al la kooperativo implicas engaĝiĝon pri aktiva partopreno."

Due, endas klarigi, kiam estiĝis la unuaj kooperativoj. Temas pri la epoko, kiam komenciĝis industriiĝo kaj malaperas la malnovaj skemoj de la malnova reĝimo. Okazis grandaj agraraj transformiĝoj kaj disvastiĝis novaj ideoj. Trans la strikte ekonomiaj ecoj, ĉe la kampo de la asociismo la kunfrataroj kaj la gildoj ekmalfermas la pason al societoj unuiĝantaj civitanojn, kiuj serĉas per la reciproka helpo vojon por plibonigi la malmolajn vivkondiĉojn. La unuaj reagoj kontraŭ la nova socia situacio, ta-

men, okazigis perfortajn incidentojn, el kiuj la plej konata estas la *ludismo,* kiu baziĝis sian agadon sur la detruado de maŝinoj kaj uzinoj. Poste aperis la laboristaj societoj, la strikoj kaj la intertraktadoj. La novaj asociaj retoj malligiĝis de la eklezio kaj kreis siajn proprajn pordistrajn centrojn.

Ĉe Anglio kaj Francio okazis la unuaj kooperativaj spertaĵoj. Je la 1827a William King gvidis unu el la unuaj konataj klopodoj en Anglio. La kreo de la prikonsuma kooperativo de la Rochdale (1844) markis historian tranĉlinion por la movado. La kialo estis, ke ĝi funkciis per baza normserio, poste konataj kiel Principoj de Rochdale, kaj al kiuj aliĝis la tuta internacia kooperativismo. Tiuj estis la ecoj difinantaj la kooperativismon ekde tiam. Tius ĉi principoj estas:




senlima nombro de socioj, profitprocento destinita al la kulturfomento, demokratia funkciado, libera aliĝo, sendependeco el politikaj partioj kaj religiaj kre-




doj, rajtegaleco inter la societanoj kaj disdivido de la plusaĵoj inter la societanoj. La influo de la utopiaj socialistoj (Fourier, Owen ktp) evidentiĝas ĉe la unuaj paŝoj de la movado.

Unu el la unuaj laboristaj asocioj, kiun ni konas esta la Asocio de Teksistoj el Barcelono (1842), kiu oferis al siaj anoj helpon kaj solidarecon okaze de malsano. La koncepton de reciproka helpo ni povas malfacile kompreni nun, kiam ni ĝuas –pli malpli– socian asekuron, kiu garantias al ni salajron, kiam ni malsaniĝas, aŭ medicinan flegadon, kiam ni bezonas ĝin. Tiam ne ekzistis tiuj ĉi servoj. La societoj pri reciproka helpo enspezis etan kotizon el la aliĝintoj kaj garantiis etan pagon por la malsaniĝintaj societanoj. Tiu ĉi servo populariĝis kaj estis oferata de ĉiutipaj societoj, kiel ekzemple iuj el la korusoj ligitaj al la Korusoj de Clavé.

Ni revenu al la kronologia fadeno, ĉe la jardeko de 1840 naskiĝas la unuaj rezistadaj societoj. Je la 1841 naskiĝas la unua federacio de laboristaj societoj de Hispanio. Taksita la forto, kiun estis akirantaj tiuj ĉi societoj, la ŝtato kaj la mastraro decidis subpremi ilin malmole. Dum la du jaroj 1854a-1856a estis malpermesataj eĉ la laboristaj asocioj. Tiam ekkomencis lukto por la asociiĝrajto senprecedenta ĉe la hispana ŝtato. Okazis la unuaj strikoj kaj estis rikoltitaj mi-


Robert Owen

loj da signaturoj.


Dum la dua duono de jarcento oni atingis ioman permesecon (Leĝo pri asocioj de la 1887a) kaj minimuman presliberon, kiu permesis krei multajn societojn kaj disvastigi la novajn ideojn, kiu alvenis de eksterlando (Proudhon...) pere de Pi I Margall, Abdó Terrades, Narcís Monturiol kaj aliaj. "La Laboristo" (1864), publikaĵo direktita de Antonio Gusart kaj "La Asocio" (1866) de Roca i Galès helpis disvastigi la kooperativistajn ideojn.

La unuaj katalunaj kooperativoj estis "La Laborista el Mataró" (1864), ŝpinada kaj teksaĵa, "La Ekonomia de Palafrugell" (1865), konsuma, kaj tiu de Canet de Mar (1865), ankaŭ konsuma. Poste aperas multaj plu, kiel "La Frateco de la Barceloneto" (1879), "La Andreana de Sant Andreu" (1879), "La Maja Floro de la Poble Nou" (1890), ktp. La unuaj klopodoj federacii la katalunajn komsumajn kooperativojn datiĝas de la 19a jarcentfino kaj la 20a jarcentkomenco. La 1898an okazis la unua asembleo Katalunetenda. Ili estis proksimume 110. Malgraŭ ilia agnoskita nepolitikemo la historiistoj notas la influon de la socialistaj ideoj. Je la jaro 1903a okazis la unua Hispanetenda asembleo. Tutmondetende la Internacia Kooperativo Alianco naskiĝis je la 1895a ĉe Londono. La kataluna kooperativismo aliĝis al IKA je la 1902a.

La katalunaj kooperativoj travivis du grandajn ekspansimomentojn. La unua estis sub la impulso de la *Mancomunitat* de Katalunio kaj la dua dum la Dua Respubliko. Estis dum tiu ĉi periodo, kiam estis leĝaro pli konkreta kaj favoranta la sektoron. Estis aprobata la Leĝo pri Kooperativoj (1931), la Bazoj de Kooperado (1934), la Leĝo pri Mutualecoj (1934), la Leĝo pri Kamparanaj Sindikatoj (1936), ktp.

La konsumkooperativismo plifirmiĝis per forta federacio, propra komunikilo ("Kooperatista Agado"), priaĉeta centralo, produktkooperativo pri sapo kaj alia pri suppasto ambaŭ impulsitaj de la Federacio mem, ktp.

Dum la milito ili suferis pro malfacilaĵoj por garantii la viktualion, pro la pliigo de la mendado kaj pro la klopodoj kolektivigi ilin. Malgraŭ ĉio ili iĝis nemalhavebla ilo ĉe la ariergardo, en multaj vilaĝoj kaj urboj okazis la unuiĝo de kooperativoj kaj ankaŭ la diversaj kooperativfederacioj unuiĝis je sola Konfederacio.


Francesc Pi i Margall

Post la milito, la frankismo aprobis la Leĝon pri Kooperado (1942) por kontroli tiujn ĉi ekonomiajn societojn sed ne por nuligi ilin. Ili estis aldonitaj al la Sindikata Ago pri Kooperado de la Movado, kiu povis vetoi la elektadon de la kooperativestraro. Laŭ Eliseu Soler "la kooperativa agado estis kontrolita de la sindikata organizaĵo de la reĝimo (...) kaj la rilato kun la Ŝtata Administracio okazis pere de la oficiala sindikata organizaĵo".

La kooperativismo suferis la subpremadon kaj la ekzilion, tamen ĝi survivis kaj nuntempe estas plurecaj kooperati-

voj kamparanaj, laboraj, servaj, transportaj kaj iuj konsumaj. Nun la katalunaj kooperativoj estas ĉirkaŭ 11.000 kun pli ol 40.000 laboristoj kaj kunordiĝas pere de la Konfederacio (www.observatori.coop). Ili rilatas kun la Internacia Kooperativa Alianco (www.ica.coop), kiu havas 222 anojn el 91 landoj. La katalunaj kooperativoj sekvendas la kooperativajn principojn, kiuj estis proklamitaj de la Internacia Kooperativa Alianco je la jaro 1995a. Ĉe Hispanio la kooperativaj laboristoj estas la 4.58% de la labora merkato. Proksimume estas unu miliono da homoj inter laboristoj kaj societanoj. Laŭ la datumoj publikigitaj de la Eŭropa Unuiĝo la kooperativoj kontribuas la 7%-n de la Malneta Ena Produkto. Ĉe Katalunio estas rimarkinda la ekzisto de lernejo pri kooperativismo (www.aposta.coop), kiu organizas periodajn kursojn kaj seminariojn.




Pioniroj de la Kooperativo de Rochdale

Elĉerpaĵo el ***Catalunya*** (Katalunio) esprimorgano de la Ĝenerala Laborista Konfederacio de Katalunio (CGT) numero 83, februaro 2007a. Esperantigita de Jurgo Alkasaro

www.revistacatalunya.cat.

# La liberecana municipemo de Murray Bookchin

***Roger Costa***



La historiisto kaj ekologiisma agitisto Murray Bookchin, naskiĝinta je la 1921a en Novjorko, estas la fondinto de la socia ekologiismo. Iu el liaj plej antaŭenirantaj proponoj estas la liberecana municipemo surbaze de la reakiro de la popolaj asembleoj kaj la rekta demokratio je la niveloj municipa, loĝantara kaj kvartala. Temas pri politika organizo surbaze de najbaraj asembleaj institucioj, kiuj per rekta demokratio federaciiĝus je konfederacio el liberaj municipoj aŭ komunumoj, fariĝantaj alternativo al la ŝtato. La municipemo batalas por la liberiĝo de la municipoj, por malsubmetiĝigi ilin al la ŝtata povo, tio estas, igi ilin kontraŭpovo. La malfacilaĵo, kiu stariĝas, estas kiel atingi anarĥiista municipo ene de la kapitalista sistemo. Tiu afero favoris sintenojn, kiuj defendas la partoprenadon je la municipaj balotadoj, tamen la municipemo ne limigas sin al tiu flanko, kontraŭe ĝi klopodas krei produktadajn, komsumajn, servajn organizojn, kiuj faligu la municipan povon.

La propono de Murray Bookchin –ĵus mortinta (2006)– deflankiĝas de la industria logiko altrudita de la kapitalismo kaj la ŝtato kaj emas al komunumismo. Ĝi ne taksas, ke la valoroj de la uzino estu forĝantoj de iu revolucio, sed plenkontraŭe. Bookchin pripensas la Parizan Komunumon kaj trovas ĝian fiaskon en la alpreno de la delegita politiko, en la ŝtatiĝo. Fakte Bookchin kontraŭstarigas la urbon –la municipon kiel liberan civitanaron, kiuj sin administras kaj formiĝas pere de la asembleo– al la ŝtato, la politika delegemo kaj la aŭtoritatismo. La aŭtoro parolas pri la popolo, kiu estas ekiĝonta, kaj kiu –venkante la privatajn interesojn de klaso– celos la ĝeneralan intereson, kiu estos administrata de la liberecana municipo. La aŭtoro pledas pro la anarĥiista komunumismo kontraŭ la individuismo kaj la sindikalismo, pledas pro la historia koncepto pri urbo aldonante al ĝi la liberecana tradicio kaj partianiĝas pro la reakiro de la politiko. Tiel li pledas por la partopreno je la municipa politiko kun liberecanaj celoj pere de kvartalaj kaj tuturbaj asembleoj. Li neas, ke tio kondukendas al la parlamentismo, kaj asertas, ke fakte tio estas agado kontraŭanta la ŝtaton kaj havas originojn kaj funkciojn ege malsimilajn. Bookchin volas venki la naŭzon kontraŭ la balotadoj –ĉar li pritaksas, ke ne ĉiuj estas egalaj– kaj memorigas pri tio, ke la politiko povas strukturiĝi per kvartalaj asembleoj kun eksigeblaj delegitoj, ĝisfunde demokratia kontregistrado, ktp.

---

COSTA, Roger: «El municipalisme llibertari de Murray Bookchin», *La Directa* 2008(102)5. Esperantigita de Jurgo Alkasaro

CC BY NC ND

---

**AFGANIO:** la realo pri la okupaciita lando priskribita surloke

# "La homamaj komisioj estas koloniaj militoj"

*La itala NRO* Emergency *estas unu el malmultaj, eble la sola, nemilitista grupo, kiu el Afganio denuncas la terurаĵojn de la okcidenta interveno.*

**Rosa Martínez**
**Romo**

"En Afganio la NATO realigas sekvon da bombadoj, kiun la NATO mem pritaksas kiel la plej grandan ekde sia fondiĝo. Nu, estas eĉ ne unu sola ĵurnalisto, eĉ ne unu sola informlinio ne apartenanta al la militistaj komuniloj". Tiun frazon proconcas itala militkirurgo, Gino Strada, fondinto de la NRO *Emergency*, kiu laboras kun militviktimoj ekde 14 jaroj. *Emergency* estas organizaĵo tre konata kaj polemika en Italio, –inter aliaj kaŭzoj– ĉar ĝi neniam ĉesis kritiki la laŭvice deĵorantan registaron pro ĝia partopreno en la afgana milito kaj pro ĝia perado dum la liberigo de la korespondanto en tiu ĉi lando de la ĵurnalo *La Repubblica*, Daniele Mastrogiacomo.

Neniu rajtas kontesti lian parolon: je la pasinta januaro la novaĵagentejoj Reuters kaj AP anoncis la nombron de 2.000 civilaj afganoj mortintaj en 2.007, ĉirkaŭ 500 el ili kaŭze de la peraera bombado kaj perteraj operacoj de la NATO. En Hispanio neniu eĥis tion.

La organizaĵo fondita de Gino Strada havas tri malsanulejojn en Afganio, unu el ili en Laskargah, ĉefurbo de la provinco de Helmand, kie okazas la plej gravaj konfrontoj kun oftaj bombadoj de la usona aerarmeo. "Ekde kvar jaroj ni estas la solaj okcidentanoj, kiuj ne estas militistoj aŭ spionoj. Ĉe nia malsanulejo okazas groteskaĵoj: la agentejoj lancas novaĵon '*30 talibanoj mortintaj en Laskargah*'. Ĉe ni ne alvenas la mortintoj, sed la plejmulto el la vunditoj estas virinoj, maljunuloj kaj infanoj ĉeestantaj propraјn domojn dum la bombado".

Strada prezentis je la pasinta 20a de majo en Madrido sian libron *Buskashi*, per kiu li rakontas la dunkaŝan vojaĝon de kuracistaro al Kabulo dum la 2001a aŭtuno, kiam preskaŭ ĉiuj internaciaj organizaĵoj –Ruĝa Kruco, Acnur, Funuhi...– urĝe pretiĝis forlasi la urbon antaŭ la tuja usona atako.

Miksaĵo el skeptikeco kaj seniluziiĝo donas la tonon de liaj vortoj, ki-



**REZISTADO.** Je dua sinsekva monato la mortokvanto de eksterlandaj soldatoj en Afganio superpasas tiun kalkulitan en Irakio

am li parolas pri homamaj komisioj –"ili estas nure koloniaj militoj", li diras– kaj pri tio, kio ŝanĝis dum la lastaj jaroj ĉe Afganio: "la Kabulaj luprezoj samnivelas tiujn de la Manhattana centro, la komuna krimkvanto ege pliiĝis, same kiel la trafiko. Triono el la urbo estas milita bazo kaj tre ofte kaj haste trapasas la urbon la armeaj veturilaroj surveturante iun. Pro sekureco –tiu ilia, memkompreneble– ili ne haltas. Unuafoje estas prostituado –kiel en ĉiu milito, prostituinojn por la trupoj– kaj grava kokain- kaj heroinmerkato, kies ĉefaj konsumantoj estas la soldatoj. Kiel sekvo, komencas vekiĝi grava maltrankvilo pri la aidoso, kio ĉe lando kun la sanitara strukturo de Afganio estus katastrofa".

La okupacifortoj atingis, "ke la homoj rigardu simpatie la talibanojn, kio ili ne faris antaŭe. Ili ne kontrolas la urbon Kabulo kaj Karzajo ne estas ŝatata. Mi kredas, ke li eliris kvin aŭ ses fojojn el sia palaco kaj kvin aŭ ses fojojn oni klopodis mortigi lin. Certe ja, nun oni voĉdonas kaj antaŭe ne. Ĉe nia malsanulejo estis homo, kiu demontris al ni, ke li voĉdonis eĉ 17 fojojn".

La virina liberigo el la talibana subpremado, simboligita de la vualo, estis unu el la argumentoj uzataj je la strategio por pravigi la okupacion de la lando, kio laŭ Gino Strada estas nenio plu ol "iligado por pravigi la okupaciado, dirante ke almenaŭ por tio ĝi utilis. Ĉe Kabulo estas eble ĉirkaŭ mil virinoj ne surportantaj vualon, sed dek kilometroj for el la urbo ĉio estas kiel antaŭe. Mi neniam kredis, ke la problemo de la virina kondiĉo en Afganio estus la afero pri la vualo. Mi memoras amikecan interparoladon kun la *mujaidina* militestro Ahmed Shah Massud je la 1999a, dum kiu mi diris lin, ke oni devis fari ion pri tio en la Panŝiro, kaj li respondis: 'Ne venu ankaŭ vi kun tiu historio pri la vualo. Se ni volas helpi la virinojn, ni klopodu doni al ili laboron kaj instruadon kaj la tago, kiam ili deziru ŝanĝi kutimojn, ili mem faros tion".

---

MARTÍNEZ, Rosa «Las misiones humanitarias son guerras coloniales» *Diagonal* 2008(82). Esperantigita de Jurgo Alkasaro

---

Intervjuo // HORST STOWASSER, IMPULSANTO DE LA A-PROJEKTO

# "Ni devas materiigi la ideojn en praktikaĵoj, en io konkreta kaj tuŝebla"


*Ferran Aguiló*

**La germana verkinto Horst Stowasser (1951) –impulsinto de la A-Projekto kaj liberecano ekde ĉiam– publikigis dekojn da anarĥiaj libroj, kiuj diferenciĝas per sia amena stilo kaj sia tute popola lingvouzo. Tiu lasta, titolita *Anarĥio!*, eksaltis tuje al la numero unu el la germana ranglisto de nefikciaj libroj malgraŭ siaj pli ol 500 paĝoj. Senlasa kompilanto de libroj kaj dokumentoj pri la anarĥiismo, li estas unu el la respondeculoj de la arĥivo-biblioteko *Das AnArchiv*.**

**Nun, kune kun aliaj gekamaradoj, li iniciatas la *B-Fazon* de la *A-Projekto.* Ili klopodas prezenti alternativon de liberecana vivdigneco antaŭ la demando pri la maljuneco ene de la kapitalisma malstabileco. Por paroli al ni pri tio, li partoprenos la Dumsomeran Liberan Universitaton venontsemajne.**

**Klarigu al ni skize la unuan fazon de la A-Projekto je la 80aj kaj 90aj jaroj.**

La ideo estas tre simpla: eliri el la senfruktaj anarĥiaj getoj kaj rekreskigi la anarĥiajn ideojn en la ĉiutaga vivo. Tio estas: starigi praktikajn liberecanajn projektojn, kiuj taugu prezenti alternativojn kaj solvu realajn malfacilaĵojn. Ni starigis la *Ökohof*-n en malnova fabriko, kiu fariĝis fokuso de la plej diversaj agadoj kaj ni partoprenis pli ol du dekduojn da domoj kaj atelieroj en la tuta regiono.



**Tamen poste vi havis krizon. Kio okazis?**

Simple ni interbaraktis. La projekto altiris la *anarĥopuristojn* kiel muŝojn kaj ili alvenis el ĉie por instaliĝi kaj kritiki. Ili ne alvenis por labori, li alvenis por konstati, ke ni eraras. Ili volis altrudi siajn dogmemajn liniojn kaj finfine ili atingis fiaskigi la tutan strukturon. Ni frakcioniĝis kaj la homoj ĵus enirintaj la liberecanan mondon forlasis ĝin naŭziĝintaj. Ankaŭ mi foriris. Tio interesiga tamen estas, ke la bazoj de la projekto mem postvivis tiun ĉi profundan krizon.

**Kia ligilo estis inter la A-Projekto kaj Katalunio kaj precipe kun Barcelono?**

Katalunio aparte elstaris ekde la komenco. Dum jaroj vizitis nin individuoj, grupoj kaj eĉ delegitaroj de kolektivoj. Kaj ĉar ili ankaŭ starigis siajn vendejojn kaj atelierojn, siajn kooperativojn kaj kolektivojn, ni interkompreniĝis perfekte, tial ke ni okupiĝis ne nur pri babilaĵoj, sed ni interŝanĝis spertaĵojn. De la katalunoj ni lernis fari figojn kun oranĝo (kaj aliajn pli gravajn aferojn), dum ni instruis ilin pri la pretigado de *Saumagen*. Tamen kio pli atentigis min, estis la malsimilaĵoj inter vilaĝo kiel Neustadt kaj urbo kiel Barcelono –ĉefe rilate de la vivkvalito kaj la deman-

daro pri la loĝejo.

**Kian imagon vi kunportis el via lasta vizito al Barcelono rilate de la nuna anarĥosindikatismo kaj la memmastrumaj spertaĵoj?**

Sendube kio plej plaĉis min estis, ke mi povis vidi ene de la alternativa Barcelono. Tio estas, la bazajn grupojn, la kooperativojn, la okupaciitajn domojn, la memstarajn kolektivojn, la kulturiniciatojn, la memmastrumajn entreprenojn kaj la loĝantarajn movadojn. Tie ni vidis efektivigitaj grandan parton de la ideoj de la A-Projekto rilate de la interŝanĝo de tio ekonomia kaj tio politika. Ĉiutagan liberecanan vivon kaj rektan lukton, homojn el ĉiuj aĝoj, sociaj tavoloj kaj malsimilaj aliĝoj kuniĝintajn je komuna aspiro: rezisti kaj ŝanĝi tiun ĉi socion al io pli bona.

**Klarigu pli al ni la B-Fazon de la A-Projekto.**

Estas du fluoj, kiuj nutras tiun ĉi duan fazon. Unuflanke la disvolvo de nova liberecana generacio sendependa de tio restanta de la A-Projekto. La alia faktoro estas pli banala: ni ekkomprenas, ke la liberecanoj ankaŭ maljunas... Malgraŭ ke ni sentas nin animojunaj, kaj malgraŭ ke ni ne volas tion, stariĝas antaŭ ni –kiel antaŭ ĉiuj– la demando pri kiel vivi digne la maljunecon. Sekve ni serĉis liberecanan respondon, kiu memkompreneble ne povas konsenti disigi la maljunulojn kaj izoli ilin en maljunulejoj.

La liberecanaj ideoj daŭre estos strangaĵoj por la homoj, se ni limigas ilin al abstraktaj pensaĵoj aŭ al la nura protesto. Tial la preskribo estas plej simpla: ni nur bezonas materiigi la ideojn en praktikaj modeloj, en io konkreta kaj tuŝebla. Nur tiam ili ekentuziasmiĝos pri la ideoj malantaŭstarantaj.

Nun la demando pri la maljuneco tuŝas centojn da miloj de homoj. Ni simple ofertas liberecanan alternativon. La homoj vidas, ke nia loĝejo estas kolektiva proprieto, ke ne estas estroj, ke ni estas solidaraj, ke ni praktikas rektan demokration kaj fine ili ekscias, ke nia devizo estas la reciproka interhelpo. Kaj se ili vidas, ke tiu ĉi modelo ankaŭ utilas al la senmonuloj, kaj ke ĉion tion oni rajtas nomi anarĥio, pli bone ankoraŭ.

**Oni povas subteni iel tiun ĉi projekton?**

Pere de la tiel nomataj *rektaj pruntoj*. Estas sistemo ekzistanta ekde dudek jaroj kaj kiu similas la ideon pri mikrokreditoj de Muhamad Yunus, Nobelpremio pri paco de la jaro 2006a. Multaj etaj kreditoj ebligas grandan projekton, kiu repagas la pruntojn per la luprezoj kaj kiu, post likvidi la ŝuldon, daŭre pagas al komuna kaso, el kiu nutriĝas aliaj projektoj. Ĉe Germanio disvolviĝis pli ol tridek projektoj per tiu ĉi sistemo kaj neniu el ili fiaskis.

El la 600.000 eŭroj, kiujn ni bezonas, ni havas la duonon. Tiuj ĉi pruntoj ekde 500 eŭroj ofertas rektan solidarformon, kie ĉiu kontribuas per sia sablero. Kaj tiuj ĉi grajnoj ne estas donacoj, sed kreditoj –portempaj apogoj redonotaj al tiu, kiu pruntedonas la monon. Tial, se vi deziras helpi nin, vi povas simple pruntedoni ion da mono al ni, por starigi tiun ĉi projekton. Kaj por povi investi ĝin, kiam ĝi estos repagita al vi, eble en via propra morgaŭa projekto.

---

AGUILÓ, Ferran: «Horst Stowasser, impulsanto de la A-Projekto», *La Directa* 2008(102)4. Esperantigita de Jurgo Alkasaro

CC BY NC ND

---

# La tekstoj


- BALANCE: «Datos estadísticos sobre el proletariado, hoy», *Kaos en la red* 2007. http://www.kaosenlared.net
- SUÑÉ MORALES, Jordi: «Cooperativisme. La història d'una alternativa», *Catalunya* 2007(83)3-4. http://www.revistacatalunya.cat
- COSTA, Roger: «El municipalisme llibertari de Murray Bookchin», *La Directa* 2008(102)5. http://www.setmanaridirecta.info
- MARTÍNEZ, Rosa: «Las misiones humanitarias son guerras coloniales», *Diagonal* 2008(82). http://www.diagonalperiodico.net
- AGUILÓ, Ferran: «Entrevista a Stowasser», *La Directa* 2008(102)4. http://www.setmanaridirecta.info